

# LA JUNA VIVO

DUŝEMAJNA  
ORGANO



POR LA  
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:  
West-Grafdijk (N.H.)  
Nederlando.  
Gironumero 209354 Nederlando.  
Tel. 10

Nederlando: jarabono f 0,75  
Unuobla ekz. f 0.03  
duobla ekz. f 0.06  
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.  
(17 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

Por progresintoj.

## MEMORAJO EL LA FRANC-GERMANA MILITO.

Okazis post la batalo apud Orléans. Dum multaj tagoj oni batalis pri la venko. Kelkaj el ni, inter kiuj mi, estis sendataj kiel antaŭpostenoj al najbara, malgranda vilaĝeto. Ni ekrajdis tien: tramalsekaj — pluvis seninterrompe jam 48 horojn — morte lacaj kaj malsataj. Singarde ĉiufanken rigardante, ni antaŭen trotis. Plurfoje fajfis kugloj el la proksimaj arbustoj ĉirkaŭ ni; sed niaj kontraŭuloj restis nevideblaj. Tri aŭ kvar el niaj viroj falis de la ĉevaloj kaj restis kuŝi; pri ili ni ne povis zorgi. Preskaŭ je la vespero ni atingis la celon; post kurbigo de la vojo etendiĝis antaŭ ni la domareto, duonvidebla pro la krepusko. Ankoraŭ mi vidas ĝin: la verda valo, kun la dometoj inter la legomĝardenoj, preĝejo kun ronda sonorilturo kaj la krucoj sur la malgranda tombejo. La sonorilo unutone aŭdigis la anĝeluson kaj pli ol unu el miaj soldatoj faris la signon de la kruco. Kiu el ni ne pensis en tiu momento pri la **propra** vilaĝo?

Nia antaŭgvardio enrajdis la vilaĝon; per tamburado la vilaĝestro kaj la pastro estis alvokataj. Kiam ni venis sur la foirplacon, la magistrato jam atendis nin antaŭ la preĝejo.

Ni faris la ordonitajn demandojn: „Ĉu la malamikoj forlasis la lokon? Kiuj trupoj trairis la vilaĝon kaj kien ili iris?”

Finfine la konsciendemando: „Ĉu tiu ĉi loko liveris civilpafistojn? Ĉu da ili ankoraŭ estas ĉi tie?”

Post tio sekvis la de nia armeo proklamitaj ordonoj kaj la solena proklamo de mortpuno por la gastigado al civilpafistoj. Kiam la gardostarantoj estis dislokitaj, ni kaj la elĉerpitaj soldatoj povis

serĉi la noktloĝejojn. Mi ricevis kun du kamaradoj tranoktejon en la pastrejo.

Unu horon poste ni sidis kvarope — ĉar la pastro aliĝis al nia societo — hejmece ĉirkaŭ la tablo en la neluksa manĝoĉambro. Ni apetite manĝis kaj nun ripozis, fumante kaj babilante.

Nia maljuna gastiganto, pli ol sepdek jara, konversaciis kun ni tiel simpatie kaj afable, ke ne unu penso pri malamikeco ĝenis la bonhumoron.

En sia juneco li pasigis kelkajn jarojn en Heidelberg kaj li montris grandan intereson pri la ŝanĝoj, faritaj post lia restado en tiu urbo.

Ĉar mi ĝuste dum kelka tempo restis garnizone en Heidelberg, mi lin povis informi; kiam mi do parolis pri iu strato aŭ promenejo, kiun la maljunulo memoris, tiam liaj okuloj ekbrilis.

Kaj bonaj, afablaj, klaraj estis tiuj okuloj! Ilia malhelblua koloro, la arĝentblankaj haroj, la bonanimeco per kiu li nomis min „mia filo” anstataŭ „sinjoro”, danis al lia personeco ion eksterordinare afablan.

Al ĉi tiu homo malamo kaj suspekto ŝajnis fremdaj.

Li rakontis al ni pri la ĝojoj kaj malĝojoj el sia ĉiutaga vivo: pri siaj amatoraĵoj, herbario kaj kolekto da maloftaj ercoj; pri la sentaŭgaj infanoj kaj la karaj libroj.

Mi eksentis por la simpla grizulo varman simpation, kaj pro la fakto, ke li apartenis al malamika nacio, mi eĉ pli ŝatis lin.

Ŝajnis, ke la maljuna pastro sentis same. Per bonvolaj rigardoj, per afabla voĉo ni komprenigis, kion ni ne povis diri: „Franco aŭ ne, vi estas respektinda grizulo.”

„Nu jes, Prusoj, — sed bravaj viroj!”

Malgraŭ nia laciĝo, ni longe kune restis. Estis jam la dekunua, antaŭ ol ni adiaŭis per: „Bonan nokton, infanoj!” kaj „Bonan nokton, via Moŝto kaj koran dankon.”

Li akompanis nin al nia bivako — lia laborĉambro. Tie ni vidis la ŝrankojn kun la malgranda biblioteko kaj la kolektoj. Malnova leda kanapo, kelkaj apogseĝoj, granda skribtablo, super kiu pendis portreto de viro severmiena; jen preskaŭ ĉio. Kaj antaŭ la fenestro granda, kovrita kaĝo.

„Jen la portreto de mia patro,” rakontis la pastro, levante la kandelon. „Ankaŭ li militservis, sub Napoleono. Tiam la roloj estis inversaj: ni estis la venkantoj en malamika lando. Ĉio daŭre ŝanĝiĝas sur la tero.” Dum momento li silentis kaj ridete ekdiris:

„Kaj jen „la flava dangero” en mia domo”, gestante al la kaĝo.  
 „Miaj kanarioj estas mia ĝojo; ĉiumatene ili venas sur la tablon  
 kaj forprenas ĉiujn panerojn, eĉ de mia telero. Morgaŭ vi vidos.  
 Sed nun vere bonan nokton, vi certe estas lacegaj.”

Li etendis al ni la manon, unue al la du aliaj, poste al mi. Kaj mi, — subita ekdeziro instigis min, — mi klinis min super tiu mano por kisi ĝin. Li forprenis sian manon kaj dum momento metis ĝin sur mian kapon: „Bonan nokton, mia filo!”

Ni kuŝigis nin, leŭtenanto F. sur la divanon, mi en unu el la apogseĝoj, kiu kun du seĝoj servis kiel lito. La tria viro, leŭtenanto R., kiu devis deĵori, ekpostenis sur ia fojnbudo ĉe la fino de la ĝardeno, de kie oni havis rigardon sur la vilaĝon kaj la gardostarantojn, kiujn li poste devis inspekti. En la vestiblo niaj servosoldatoj estis lokitaj.

Mi jam dormis kelkajn horojn, kiam sonis pafo. Tuj mi vekigis, pensante ke mi sonĝis. Okazis jam plurfoje, ke eĉ en la dormo mi aŭdis pafadon. Sed tuj poste sonis dua pafo, — tria. Leŭtenanto F. ankaŭ vekigis; rapide ni surmetis la vestojn, dum la pafado daŭris kaj ni vidis la ofte viditan spektaklon de ruĝaj flamoj. En malpli ol dek minutoj ni staris sur la foirplaco.

En la vilaĝo oni subite estis pafinta al niaj soldatoj; post tio niaj soldatoj bruligis la domojn, el kiuj venis la pafado. Kvin soldatoj kaj leŭtenanto R. mankis.

Supozante, ke leŭtenanto R. foriris al la gardostarantoj, mi direktis min al lia elrigardejo por transvidi la vilaĝon.

En la malluma budeto mi faletis, falis kaj aŭdis sufokitan dolorĝemadon. Mi ekstaris kaj lumigis alumeton: tie kuŝis la servanto de leŭtenanto R. kun bajonetpiko en la brusto. Kelkajn paŝojn pli malproksime mi trovis leŭtenanton R. kun la naztuko en la buŝo, mortinta.

Je la kvina matene ni interkonsiliĝis; la vilaĝestro, la pastro kaj diversaj aliaj loĝantoj estis pridemandataj. Baldaŭ montriĝis, ke trupo da civilpafistoj el la ĉirkaŭaj komunumoj, al kiu apartenis la nevo de la pastro, — juna arbargardisto, — en la nokto sekrete penetris en la vilaĝon kaj atakis niajn virojn.

Tiam okazis io terura. Paŝtisto venis antaŭen kaj deklaris, ke li pasintvespere vagante en la ĉirkaŭaĵo, vidis la pastron, vidis, ke ĉi tiu enlasas sian nevon tra flankpordo. Mi rigidigis, kvazaŭ mi mem estis la kulpigito.

„Ĉu tio estas vera, patra moŝto, ĉu efektive estas vera tio?” Li

levis la kapon kaj fikse alrigardis min per la sinceraj bluaj okuloj.  
 „Estas la vero” li serioze respondis, „sed nur por doni al la



malfeliĉa knabo, la filo de mia fratino, ŝirmejon en la kapinstalo.  
 Mi scias nenion pri liaj intencoj, kreu min.”

Pri ĉi lasta mi estis konvinkita ,sed tio ne utilis; kio sekvos —

mi sciis tion sufiĉe bone. La divizio-komandanto, informita per kuriero, devis decidi. Je la naŭa la verdikto atingis min. La vilaĝon ni devis forbruligi; la pastron ni devis pendigi antaŭ lia domo.

Mi sendis rapidege urĝan komision al la komandanto, petegis pri mildigo de la terura verdikto, pri pardono.

La komisiito baldaŭ revenis kun ordono. La verdikton ni devis plenumi, mi mem devis fari.

Ho, kiam mi tion legis, mi certigas al vi, ke tiam malespero min kaptis; la abomeno kontraŭ tio, kion mi devis fari, estis tiom forta, ke mi serioze pripensis mortpafi min. La pensoj pri miaj familianoj tamen retenis min.

Kaj kio sekvis ... La unuaj teruraj impresoj feliĉe malfortiĝis; kaj tamen vivas ankoraŭ multaj detaloj en mia memoro. Tia estas la milito, ĉio estas oferata al la sola celo.

Unue mi devis komuniki al mia maljuna amiko la mortverdikton. „Mi atendis tion,” li respondis trankvile kaj digne. „Mi estas preta.”

Tamen, kiam mi diris al li, ke la vilaĝo estos bruligata, li ekkriis. Bruligata, ĉio, kion li amis surtere, bruligata. Lia vilaĝo kun la kara preĝejo, la lernejo, la hospitalo, en kiu estis ankoraŭ kelkaj malsanuloj, kiujn oni devos forlasi, liaj kolektoj; verŝajne li pensis ankaŭ pri la gajaj, flavaj birdetoj. Mi ne scias, pri kio li pensis, sed lia malespero estis kortuŝa.

Kaj terure, terure, kio sekvis, tion mi ankoraŭ vidas .....

Kiam mi diris al li la verdikton „per la ŝnuro”, la maljunulo genuis antaŭ mi; etendante al mi la manojn, li petegis, ke oni mortpafu lin. „Ne pendigata, mia Dio! Ne tian senhonorigan morton! Pro la Dia volo la kuglon!”

Sed la morton de l'bravuloj li ne rajtis morti.

Mi ree vidas, kiel oni laŭ mia ordono metas la ŝnuron ĉirkaŭ lian kolon, vidas — ne, en tiu momento mi fortunis min.

Poste mi rekuraĝigis min kaj lin rigardis. Mi vidas la tutan vilaĝon en flamoj; inter la malbenoj kaj venĝokrioj de la loĝantoj, la blekado de la timigitaj brutaroj en la brulantaj staloj, dum la soldatoj mortigis ĉiun, kiu klopodis estingi la fajron. Mi vidas nian grupon foriri el la antaŭ unu tago tiom prospera vilaĝo, maro el fajro post ni, baldaŭ rubejo el cindro. Kaj tra ĉio, ĉiam kaj ĉie la afablaj, bluaj okuloj de la maljunulo.

Ho, tiuj okuloj, tiuj okuloj neniam mi forgesos ilin!

B. VON SÜTTNER.

Trad.: VANE.

## TRE ESTIMATAJ SAMIDEANOJ.



Mi estas dudek okjara bakisto. Mia naskiĝloko estas Biŝolj, urbo en la suda parto de Jugoslavio. Malbonaj cirkonstancoj kaj vivrimedoj ofte devigas min vagi de unu loko al la alia. Mi estis eĉ en Bulgario, kie mi lernis Esperanton. Ĉie mi renkontis esperantistojn, sed nur en urboj.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi alvenis Kragujevaen (urbo) sed bedaŭrinde ĉi tie ne estas esperantistoj.

Lun dimanĉmatenon estis belega printempa vetero, la suno brilis, kaj la birdoj kantis sian ĉarman kanton. Mi promenis ekster la urbo, por ke mi almenaŭ iom ĝuu la belegan naturon. Kia surprizo! Mi renkontis deklaran vilaĝan knabon, kun verda stelo sur la brusto. Li estis simple vestita, kaj sur

la piedoj li havis tute disŝiritajn ŝuojn. Li marŝis tre rapide, portante sufiĉe grandan korbun kun floroj. Mi salutis lin esperante, li resalutis kun granda miro, demandante: „De kie vi venas, Sinjoro?” Ni interkonatiĝis kaj interparolis dum kelkaj minutoj. Li diris al mi, ke lia patro lernis Esperanton antaŭ kvin jaroj, dum sia soldatservo, kaj reveninte hejmen, li edukis siajn infanojn kiel esperantistojn. Nun li diris: „Mi petas sinjoro, pardonu al mi, mi devas rapidi al la urbo, por vendi florojn.” Vole ne vole mi adiaŭis lin. Rigardante post li, mi staris tute senmova, kvazaŭ mi estis najligita. Li jam malaperis. Mi pensis: Ĉu estas vere, aŭ ĉu mi sonĝas? Mizera, malriĉa, deklara knabo, perfekte parolas esperante! Dum liaj feliĉaj kamaradoj ludas, kuras kaj kaptas papiliojn, li devas vendi florojn, helpi al siaj gepatroj, perlabori por siaj pli junaj gefratoj. Tamen li ellernis Esperanton!

Mi devis revidi lin. Mi deziris ree interparoli kun li: Mi devis ekscii, ĉu en lia vilaĝo estas pli da esperantistoj, ĉu ili legas esperantajn librojn kaj gazetojn. Tuj mi reiris al la urbo, kaj post longa vagado en la al mi ankoraŭ ne bone konata urbo, mi trovis mian novkonatulon kaj samideanon. Antaŭ la pordego de la uba preĝejo li petegis al urbanoj aĉeti liajn florojn. Sed bedaŭrinde, lia petego estis vana. Nur kelkaj bonkoraj sinjorinoj aĉetis florojn.

Nun ni ree interparolis kaj mi eksciis, ke la vilaĝanoj ne interesiĝas pri Esperanto kaj bedaŭrinde ili mokas la esperantistojn. Sed spite li diris: „Ni en nia familio nur parolas esperante!”

Lia patro legas la gazeton „La Suda Stelo”. Li ricevas senpage eĉ kelkajn eksterlandajn gazetojn. Mi demandis: „Ĉu vi ricevis iun infangazeton aŭ libreton en Esperanto?” Li diris: „Jes mi ricevis unu ekzempleron de „La Juna Vivo”. „Ĉu vi ŝatas ĝin?” „Jes, Sinjoro, el ĉiuj libroj kaj gazetoj mi plej preferas „La Juna Vivo”. Karaj samideanoj, mi aldonas portreton de mia novkonatulo, mi havigis al li novan veston kaj mi pagos unu jaran abonon je „La Juna Vivo”.

Vidu, en lia mano estas la gazeto. Se vi povas, bonvolu fotografigi en „La Juna Vivo” vian junan leganton en Jugoslavio. Lia nomo kaj adreso estas: Prvoslav M. Filipovic, Korman ap. Kragujevae.

Kara S.ro redaktoro, se vi estas amiko de nia kara Esperanto, bonvolu tuj sendi al li vian gazeton. En la nuna tempo mi ankaŭ estas senlabora, sed mi esperas rapide trovi laboron, kaj post unu monato mi sendos al vi mian ŝuldon. Mia adreso estas: Veljko Stepanovic, pekar (bakisto) paŝiceva Nr. 9, Kragujevae.

Samideane,  
V. STEPANOVIC.

## LA DUDEKA LECIONO.

### Ho, kara frateto!

**A.** Petro gastloĝis dum kelkaj semajnoj ĉe la geonkloj ekster la urbo. En tiu tempo **naskiĝis** frateto. Nun li ree venis hejmen.

„Patrino, patrino!” Petro kriis, kaj li ĉirkaŭ-brakis la patrinon. Tiu ĉi **kisis** lin kaj diris: „Mia karulo! Mi tre ĝojas, **ke** vi ree estas ĉe mi!”

La patrino nun ankaŭ **salutis** la **parencojn**, kiuj **akompanis** lin. Petro deziris tuj vidi la frateton.

„Li **ĝuste** dormas”, diris la patrino, „Ĉu ni unue manĝos? La vojaĝo per la ŝipo daŭris longe!”

„Mi antaŭ ĉio deziras vidi la frateton,” diris Petro.

La patrino ridis. „**Nu**, venu do,” ŝi diris, „Sed estu tre silenta.”

**B.** Sur la piedfingroj la infanoj sekvis la patrinon al la apuda ĉambro. Tie staris la **lulilo** de la malgranda Heĉjo.

Petro **singarde klinis** sin super la **bubeto**. Li nur **parte** povis vidi la kapeton. Unu maneto kuŝis sur la kovrilo. Estis **kviete** en la ĉambro. La frateto dormis. Petro rigardis al la patrino:

„Ho, kiom malgranda kaj kara!” li flustris. Sed tamen la infaneto plaĉis al li. Momenton li tuŝis la maneton. „Kiom **mola** ŝi estas! Heĉjo kaj Manjo ankaŭ rigardis, **precipe** Manjo. La malgranda Heĉjo ne tute **plaĉis** al ŝi! Poste ili iris al la familia ĉambro.

- a. Lenu bone la novajn vortojn.  
 b. Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.  
 c. Legu kelkfoje la duan parton de la leciono (B) kaj rakontu la enhavon



d. Respondu al jenaj demandoj:


Kie gastloĝis Petro? Kio okazis hejme? Ĉu Petro ĝojis, kiam li venis hejmen? Kion faris la patrino? Kiuj akompanis Petron? Ĉu Petro tuj deziris manĝi? Kial ne? Kion diris la patrino? Kie estis la frateto?

**Ĉu tiu numero de „La Juna Vivo” estas la lasta de la unua jarkolekto. La tuta jarkolekto, preskaŭ 200 paĝa libro en arta kovrilo, estas havebla ĉe la redakcio. Prezo: Por Nederlando 0,75 guldeno por aliaj landoj 0,80 guld. 1,7 sv. fr.**

**La rabato por la abonantoj estas 20 %.**



Majo 1935



## LA JUNULARO KAJ LA MONDPACO.

Ĉi tiu gazeto estis eldonata la unuan fojon kiel junulargazeto, okaze de la 18a de Majo, la Tago de Bonvolo, nur en Nederlando en 1928, por infanoj 10—14 jaraj. En 1929 aperis la franca eldono. En 1930 estis elektata internacia redakcio, kiu klopodas eldoni ĝin en kiel eble plej multe da lingvoj kaj landoj. En ĉiu eldono la teksto kaj la bildoj grandparte estas egalaj. Nun ĝi aperas en la lingvoj: nederlanda, franca, angla, germana, kimra, japana, malaja, hina, pola, sveda, kaj Esperanta.

Bonvolu mendi nur antaŭpage ĉe S-ino Romeyn, Nassau Zuilensteinstr. 2, Den Haag, Nederlando. Poŝtekkonto: 100325.

La prezo estos: 50 ekz. 1.5 gld. (kun 10 % sendkostoj); 1 ekz. 0.05 gld. (1 gld. = 2.1 sv. fr., 0.7 dol.)

### LA TUTMONDA RADIA MESAGO DE LA KIMRA INFANARO.

El ludejo, lernejo kaj hejmo, ni, geknaboj de Kimrujo, salutas la geknabojn de la tuta mondo. Denove la printempo vizitas nian malgrandan landon: La printempo, kun sia beleco de arbo kaj floro. Kaj ankaŭ ni infanoj estas de la printempo; ĉar per ni la mondo refariĝas juna. Do en ĉi tiu Tago de Bonvolo, ni ĉiuj kunmetu manojn en vivanta ĉeno de kamaradeco, kiu enrondigas la tutan mondon!


Hodiaŭ ni deziras memori kun danko ankaŭ tiujn, en ĉiu lando, kiuj renovigis la vivon kaj ĝin riĉigis, venkante malsanon, aŭ kiuj per sia laborado, venigis sanon kaj feliĉon al la homaro.

La scienco faris nin najbaroj: Bonvolu fari nin amikoj.

## RESPONDOJ AL LA ESPERANTA MESAĜO.

Respondon al la Esperanta mesaĝo oni sendu al S. ino A. van Maanen—Martin, la sekretario de nia nederlanda komitato de l'Bonvola Tago, Z. Amstellaan 192, Amsterdam, kiu ĉiujare kun Antoinette van Dijk je la 18a de Majo elsendas la mesaĝon. Tio ĉi okazos ankaŭ nunjare, en la holanda, franca, angla, germana lingvoj kaj Esperanto, kun muziko kaj deklamo.

### MIA UNUA VOJAĜO.



Estante malgranda knabino, mi faris en la someraj ferioj eksterlandan vojaĝon kun miaj gepatroj.

Kun la nazo premita al la fenestro de la vagonaro, mi staris sen-spire pro atendo.

Kion mi vidos en la fremda lando? Kiel ili aspektos, tiuj fremdaj homoj?

Sed apenaŭ ni terpasis la doganstation, kiam mia unua ekkrio estis esprimo de vera elrevido.

He ..... ĉu tia estas la fremda lando???

Mi vidis verdan herbon — herbejojn, same

me verdaj kiel niaj. Diverskolorajn bovinojn, same revemaj kiel ĉe ni, pastiĝantaj.

Mi vidis kampulojn melkantaj; ili portis blujn kitelojn. Mi vidis veturilon, ĉevalon — ĉio, ĉio samsama, precize kiel ĉe ni.

Eĉ la infanetoj, malgrandaj, dikaj, gajaj etuloj kun malsekaj

nazetoj kaj malfermitaj buŝetoj, rigardantaj la trajno-monstron. Precize kiel ĉe ni!

Mi vidis patrinojn, kiuj portis la suĉinfanojn surbrake, dum ili babilis kun la najbarinoj, antaŭ la sojlo de la malfermita dompordo. Ili havis mikskolorajn antaŭtukojn — ankaŭ kiel ĉe ni.

Ĉu tio do estas la fremda — la alia lando? Ĉu tiuj homoj do estas similaj al niaj? Ĉu ne estas kiel en la fabeloj, en kiuj ĉio estas mirinde malsimila?

Kaj tiel estiĝis en mi centoj da demandoj. Estis tamen trankvilingo, ĉar mi sentis min ne fremda — ne tima — kvankam mi estis malproksima de la hejmo.

Tiun ĉi senton multaj homoj verŝajne havis, kiam ili unuafoje vojaĝis kaj kvankam oni nur poste komprenis, ke tamen multaj aferoj estas aliaj, kaj ke ĉiu lando havas proprajn kutimojn, kostumojn, kulturon — oni tamen ne povis senti, ke tiuj homoj, kvankam parolantaj fremdan lingvon, tamen estas homoj kiel ni. Kaj ke iliaj infanoj ankaŭ faras petolaĵojn kaj havas amatoraĵojn kiel niaj.

Sed se oni sentis tion, oni ankaŭ scias, ke franca patrino same amas la infanon kiel germana — kaj ke ili estas same malĝojaj, genuante tie sur la tombo de siaj filoj, kiujn ili perdis en la milito.

La filoj batalis unu kontraŭ la alia. .... Ambaŭ mortis en la batalo.

La patrinoj forgesas, ke ekzistas limoj — ili ne sentas sin fremdaj unu al la alia. Unu vidas en la alia sin mem. Kune ili ploras — ili donas reciproke la manon. — Ili forviŝas la larmojn — kaj kiel amikinoj ili hejmen iras .... firme decidinte, doni al ĉi tiu sento de amikeco siajn plej bonajn fortojn.

Ili sentas, ke nova vivo ilin atendas — vivo de laboro — de konstruado. Kune ili volas pripensi, kiel forigi de aliaj patrinoj tiun ĉagrenon, kiel ŝirmi aliajn kontraŭ nova, abomena milito .... ili volas ekzili la militon!

Trad. Vane.

---

Ĉar pli facile, ke ĉiuj lernu unu aferon, ol unu homo ĉiujn aferojn.

Comenius 1641.

## LA NOBEL PREMIO.

Alfred Nobel estis la sveda kemiisto, kiu naskiĝis en 1833 kaj poste iĝis mondfama pro unu el la plej rimarkindaj inventoj de sia epoko: en 1862 li inventis la dinamiton, eksplodigilon kun multe pli forta efiko ol pulvo. Ĝi montriĝis eksterordinare utila ĉe min-laboro, same kiel ĉe la fosado de tuneloj, kanaloj kaj ankoraŭ, ho, tiom pli da utila kaj benoriĉa laboro.

Sed bedaŭrinde iom post iom oni komencis uzi la dinamiton ankaŭ por militceloj kaj tiam ĝi havis la plej terurajn efikojn ..... kaj ĉi tion Nobel vere neniam volis.

Kiam en 1910 Nobel mortis, lia testamento montris, ke li deziras utiligi sian tutan riĉaĵon, preskaŭ 14 milionojn da dolaroj, jene: ĝi estu kapitalo, kies rento servos por ĉiujare disdoni premiojn de proksimume 140.000 dolaroj al 5 viroj aŭ virinoj, kaj nur al tiuj, kiuj en diversaj fakoj faris eksterordinarajn servojn al la tuta homaro.

Estos unu premio por fiziko — unu por kemio — unu por medicino — unu por literaturo — kaj finfine kaj plejbone: unu por tiu, kiu plej meritplene laboris por la progresigo de la mondopaco!

Nobel ankaŭ estis granda amiko de Bertha von Süttner, kiu, kiel oni scias, ekstreme fervore laboris por la paco.

Por ke oni povu disdoni ĉi tiun lastan premion, la sveda parlamento ĉiujare elektas komisionon, kiu decidas, kiu en la tuta mondo faris la plej bonan laboron por progresigi la mondopacon.

La pasintan jaron Arthur Henderson ricevis tiun premion, dank' al la treege lerta maniero, en kiu li gvidis la Konferencon por Senarmigo en Genève kaj ĉiujfoje sukcesis venki grandajn malfacilaĵojn. La celo de ĉi tiu Konferenco estis malpliigi paŝon post paŝo la armadojn. Sed estis tiel nekredible malfacile akiri tion, ke la Konferenco decidis, provizore ĉesigi sian laboron! Sed Henderson, tiu forta, energia, admirinda skoto eĉ en sia 72a jaro ankoraŭ neniom perdis de sia juneca fervoro kaj ne ĉesis rokfirme kredi, ke iam ĉi tiu laboro estos benata, se oni nur persistos!

Kiel knabo li estis laboristo en metalfabriko. Tiutempe li havis malfacilan karakteron, sed sub bona gvidado li sukcesis venki tion kaj iom post iom li akiris ĉies estimon, ne nur pro sia granda inteligenteco kaj senekzempla diligenteco, sed ankaŭ pro sia granda komplezo. Li fariĝis ano de la komunuma konsilantaro en New-

castle kaj mallongan tempon post tio eĉ urbestro. Poste Parlamento kaj eĉ Ministro de Instruado (Imagu, li, kiu neniam studis!) kaj, ho, ankoraŭ tiom pli, ankaŭ sur internacia tereno.

Kaj same estis li, kiu kiel Prezidanto de la Konferenco por Senarmigo, akceptis la milionojn da subskriboj, kiuj alfluegis el ĉiuj landoj de la mondo kaj nun ankoraŭ estas konservataj en granda salono.

Ĉe la granda festo en Genève, antaŭirinta al la Konferenco por Senarmigo, centoj da infanoj, en la naciaj kostumoj de ĉiuj landoj, kantis por Henderson la belan kanton de Jaques Dalcroze:

„Se ĉiuj infanoj de la mondo

Volus etendi reciproke al si la manojn, .....

Kaj dume ili, precize kiel en la titolbildo de ĉi tiu gazeto, dancis ĉirkaŭ grandegan terglobon kaj prezentis malgrandajn teatraĵojn.

(el la angla Trad. MOLLIE KEISER).

### RESPONDOJ AL LA RADIOMESAĜO.

Ĉiujare la amaso da respondoj en Wales estas pli kaj pli granda, kaj multaj landoj sendas inter si apartajn mesaĝojn. Pasintjare venis respondoj el 74 landoj!

El **Francio** venis, kiel ĉiam, plej multe da respondoj, ankaŭ apartaj, el la lernejoj. Inter alie: „Jes, **devas** veni daŭra paco, por ke ĉiuj belaj inventoj estu uzataj nur por la bono de l' tuta homaro!”

Ankaŭ venis albumo kun 50 propraj desegnoj de knabinoj 10—14 jaraĵ.

El **Italio**: „Ke la tuta Eŭropo fariĝu unu granda familio!”

El Ĉeĥo-Slovakio: „Ni konstruos kune kun vi ĉiuj pli bonan mondon kaj ĉiu el ni helpos laŭpove!”

El **Norvegio**: „Kaj finfine ni havas unu komunan celon: progresigi la sentojn de simpatio kaj unueco inter la nacioj kaj ĉiuj klasoj kaj ĉimaniere kunhelpi al la grandioza laboro por la Paco, kiun komencis noblaj gevoj en ĉiuj landoj, kaj plie, pretigi la vojon al daŭrigo de tiu laboro en la venonta generacio.”

trad. Vane.

En **Nederlando** subskribis miloj da infanoj nian respondon, ankaŭ en la nomo de junular-asocioj, kaj ni esperas, ke, ĉar la res-

pondo nun estas skribita de la infanoj mem, ankoraŭ multe pli da listoj kun subskriboj el multego da lernejoj povos esti sendataj al Wales. Pli kaj pli oni festas la Tagon de la Ligoj de Nacioj en Nederlando. Ekz. en Beemster per manifestacio el 300 infanoj tra la vilaĝo, muzikistaro antaŭe, ĉiu infano kun blua memfarita flageto kun surstebita blanka kolombo. Ĉiuj kune kantis belajn packantojn en la muziktendo. Poste ludo de marionetoj „Jan Klaasen en Feliĉolando”, por plenplena salono kaj ankoraŭ teatraĵo, en kiu la infanoj kunludis kaj farita de la instruisto. Kaj kiel fino regalo per glaciaĵoj kaj peco de la bongustegaj „Ligo de Nacioj tortoj”, el kiuj la vilaĝestro ektranĉis la unuan.

### MI SERVAS.

Kaj do: mi helpas, kie mi nur povas helpi kaj mi volas amikiĝi kun infanoj el la tuta mondo — sed ankaŭ en la hejmo, en la lernejo, en mia propra lando kaj ĉie havigi al mi bonajn amikojn.

Rilate al la paclaboro estas unu el la plej agrablaj aferoj: Interŝanĝo de interesaj albumoj, faritaj de la tuta klaso, aŭ eĉ de la tuta lernejo. Al ĉiu tio ankaŭ pli junaj infanoj povas helpi.

En la albumojn oni gluas ĉion, kio povas interesi fremdajn infanojn. Desegnaĵoj, ilustritaj poŝtkartoj, sekaj floroj, malgrandaj manlaboroj, foto de la klaso, de specialaĵoj el nia lando, ktp.

Hazarde venis multe pli da albumoj el fremdaj landoj al Nederlando, ol inverse — Kvankam jam centoj da ili estas senditaj de holandaj infanoj al fremda lando. Pri albumo oni petu al: La Sekretariejo de la ĉefestraro de la Ruĝa Kruco, Princessegracht 27, den Haag. Tie estas: 11 albumoj el Kanadio, 7 el Usono, 7 el Japanio kun kvar skatoloj da ludiloj, 1 el Aŭstralio, 3 el Hungario kun du pupoj kaj kelkaj leteroj, 2 albumoj el Bulgario, 1 el Polio kun du leteroj aparte, kaj 1 pupo el Estonio.

Sed kompreneble estas, ke la tuta klaso kiel eble plej baldaŭ sendu al tiuj infanoj memfaritan albumon; oni sendu ĝin al la Ruĝa Kruco, kiu transsendos ĝin. Do, kiu entuziasmigos sian klason por tio? Estas ja tute ne afable, ke centoj da infanoj el eksterlando kun plej granda plezuro faris ĉi tiujn albumojn speciale por holandaj infanoj ..... sed ricevis nenian respondon!

Trad. Vane.

**Vera paco postulas: amikecon, fidon, justecon.**

## LETERO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO DE LA LIGO DE NACIOJ AL LA INFANOJ DE LA MONDO.

Por la 18-a de Majo, 1935.

Hodiaŭ estas la „Tago de Bonvolo” kaj la aero estas plena je mesaĝoj de amikeco, kiujn la Radio-stacioj dissendas: mesaĝoj de la infanoj de Kimrujo kaj la respondoj, kiujn sendis al ili la infanoj de la kvin kontinentoj kaj de la malproksimaj insuloj. La voĉoj de la junaj homoj, kiuj en via nomo parolas antaŭ la radio, ĉiuj esprimas la bonan volon de tiuj, kiuj ankoraŭ ne atingis la aĝon de 15 jaroj kaj ilian deziron al komuna laboro por la bono de ĉiuj. Ĉar hodiaŭ estas la 18a de Majo, la Tago de Bonvolo.

Sed kiel estos morgaŭ? Kion vi faros morgaŭ por plenumi viajn promesojn? Morgaŭ vi eble aŭdos pri konkuradoj kaj pri disputoj, kiuj disigas viajn respektivajn patrujojn, pri malnovaj, amaraj kvereloj el iu malfeliĉa pasinteco, kiuj nur tre malfacile estas forigeblaj. Morgaŭ vi eble kun senkuraĝiĝo demandos al vi, kian utilon havas forta laborado, ĉar spite de tio viaj gepatroj estas senlaboraj. Morgaŭ vi eble renkontos homojn, kiuj priridas viajn mesaĝojn de hodiaŭ: „Estas nur vortoj, nenio krom vortoj”, ili diros. „Kian bonon faros belaj vortoj?”

Kaj efektive estas la vero, ke tio, kion ni bezonas, estas agado. Ĉu vi kredas, infanoj, ke por solvi problemojn, finigi malpacojn, forgesi malamon kaj por ĉesigi senlaborecon, sufiĉas, ke vi dissendas amikajn mesaĝojn? Vi tre bone scias, ke ne estas tiel. Ĉi tiu kompatinda, freneza mondo bezonas pli efikajn rimedojn. Ĝi bezonas nin, ĉiujn. Al ni ĉiuj kaj precipe al la junularo la tasko, iom restarigi la ekvilibron, kaj la komprenon pri ĝustaj proporcioj en la mondo. Kiel vi faros tion? Per studado kaj poste per agado.

De morgaŭ vi klopodos ekzerci vin en sinkontrolo kaj sinregado: Vi lernos resti trankvilaj kaj objektivaj, por ke vi estu kapablaj nepartie studi la kaŭzojn de ĉiuj tiuj malpacoj.

Tiam vi povos fari decidojn en viaj propraj landoj, vi konos ĝisfunde ĉi tiujn delikatajn aferojn kaj vi kapablos trankvile ekzameni ilin kun la koncernaj popoloj, ĉu amikoj aŭ malamikoj. Vi scios kiel trovi la justajn kompromisojn, nur petante honestajn kaj egalajn oferojn de la kontraŭaj partioj. Vi scias same bone kiel mi,

ke finiĝi disputon per batalo ne estas la taŭga maniero por trovi justan, racian kaj daŭran solvon; male, tio nur kondukas al malamikaj sentoj kaj al la kreado de novaj malfacilaĵoj.

Do firme decidu eklabori. Ĉar vi devos batali pacience, kaj lojale kontraŭ senfina nombro da senkompataj malamikoj. Ĉu mi diru al vi kelkajn el ĉi tiuj teruraj malamikoj, kiujn vi devos venki? Kelkaj estas naturaj katastrofoj kiel ekz. inundoj, sekeco kaj nutraĵmanko. Aliaj estas malsanoj, epidemioj, plagoj. Krome estas mizero, malpureco, malklereco, timo, sklaveco, senlaboreco kaj aliaj aferoj.

Kaj ĝuste tial la Ligo de Nacioj ekzistas. Ĝuste tial ĝi devas fariĝi pli forta kaj pli efika. La Ligo de Nacioj povas organizi mondatakojn kontraŭ naturaj katastrofoj, kontraŭ malsanoj, mizero, senlaboreco, malordo kaj malŝparemo.

La Ligo de Nacioj bezonas virojn kaj virinojn por heroa batalado, ne kontraŭ aliaj homoj, sed kontraŭ tiaj malamikoj, kiajn mi menciis. Ĝi klopodas instigi la homojn forĵeti la militon kiel metodon por finiĝi siajn malpacojn kaj fari tion per arbitracio kaj per kunlaboro.

---

### BONAJ NOVAĴOJ.

Kvankam inter Rusio kaj Japanio estas malpaco, oni tamen sendis 100,000 jen el Rusio al Japanio, kiam tiu ĉi lando estis trafita de ciklono.

Dum en ĉiuj landoj oni estis maltrankvila ke la reveno de la Saarregiono al Germanio estigos grandajn malfacilaĵojn, tamen ĉio glate ordiĝis, dank' al la bona volo de Germanio kaj de Francio.

Dum antaŭe en la lernolibroj de ĉiuj landoj estis la plej strangaj, kaj ofte ne tre flataj rakontoj pri fremdaj landoj, aŭ ilia historio, nun de ĉiuflanke la historiistoj kaj instruistoj klopodas plibonigi tion.

---

La bildo sur paĝo 184 estas el: *Eigenhuis en van den Blink*, Op zonnige wegen, eldonita de J. B. Wolters, Groningen-Batavia.

La bildo sur paĝo 188 estas el: *Ligthart en Scheepstra*, Dicht bij Huis, same eldonita de J. B. Wolters.